# Kongresaj ĉambroj

Jen biografiaj notoj de elstaraj esperantistoj, kiun ni honoras en tiu ĉi Japana Esperanto-Kongreso (JEK) per ĉambro-omaĝo.

**Halego / 大ホール ZAMENHOF** L. L. Zamenhof (1859-12-15—1917-04-14):

La kreinto de Esperanto. Li publikigis en Varsovio la unuan lernolibron de Esperanto en 1887-06-27. En 1959 Unesko proklamis lin unu el la grandaj personecoj de la homaro.

**Halo / 小ホール OSSAKA Kenĵi** 小坂狷二 (1888-06-28—1969-08-01):

Patro de Esperanto-movado en Japanio. Ĉefulo de la fondintoj de Japana Esperanto-Instituto. Li verkis multajn lernolibrojn de Esperanto.

**Provludejo / リハーサル室 MIYAZAWA Kenzi** 宮沢賢治 (1896-08-27—1933-09-21):

Poeto, fabelisto tre ŝatata de japanaj popolanoj. En 1926, li aŭskultis la paroladon de Gustaf John Ramstedt, kiu rekomendis, ke Kenzi verku en Esperanto por ke homoj tra la mondo povu legi. Pro troa okupiteco kaj malsano, lia Esperanto-lernado ne bone progresis, tamen videblas influo de Esperanto en liaj verkoj.

**Granda ĉambro / 研修室 ludovikito** いとうかんじ (1918-01-15—2005-04-25):

Mondkonata zamenhofologo kiel “ludovikito”. Li verkis japanlingve 7-voluman biografion de Zamenhof, kaj kompilis Plenan Verkaron de L.L.Zamenhof. Ossaka-premiito en 1977.

**407 ITO Saburo** 伊東三郎 (1902-11-16—1969-03-07):

Esperanto-poeto, aktivisto de proletaria Esperanto-movado. Aŭtoro de “Zamenhof, la patro de Esperanto”. Li instruis Esperanton en Centra Laborista Kolegio (Ĉuo Roudou Gakuin) dum multaj jaroj kaj kreskigis multe da bonaj esperantistoj. Ossaka-premiito en 1950.

**406 MIJAKE Ŝihej** 三宅史平 (1901-10-16—1980-05-29):

Li estis longe ĝenerala sekretario de Japana Esperanto-Instituto. Akademiano. Li kompilis Vortaron de Esperanto en 1965. Ossaka-premiito en 1976.

**403 MIYAMOTO Masao** 宮本正男 (1913-01-08—1989-07-12):

Ĝenerala sekretario de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj. Akademiano. Li kompilis Esperanto-Japanan Vortaron en 1963 kaj Japana-Esperanto-Vortaron en 1983. Restas liaj multaj Esperantaj verkoj originalaj kaj tradukaj. Ossaka-premiito en 1973.

**402 MIZUNO Yoshiaki** 水野義明 (1932-06-01—2012-06-17):

Profesoro de la universitato Meiji pri la angla lingvo. Li tradukis verkojn de L.L.Zamenhof kaj tiujn de esperantistoj en la japanan kaj eldonis ilin. Aŭtoro de triopa vojaĝ-raportoj en Sovet-Unio, Eŭropo kaj Sud-Ameriko. La prezidanto de Esperanto-Ligo en Regiono Kantoo, honora konsilanto de JEI, Ossaka-premiito en 1995 .

**307 HASEGAWA Teru (Verda Majo)** 長谷川テル (1912-03-07—1947-01-10):

Ŝi eklernis Esperanton kiam ŝi estis studento de Pedagogia Kolegio de Nara por Virinoj. Post la edziniĝo al ĉina esperantisto/studento, ŝi transloĝiĝis en 1937 al Ĉinio, kie ŝi denuncis japanan invadon kontraŭ Ĉinio. Ŝi multe verkis en Esperanto en la nomo de "Verda Majo".

**306 YANAGITA Kunio** 柳田国男 (1875-07-31—1962-08-08):

Folkloristo. Pioniro kaj fondinto de japana folkloro. Esperantistiĝis en 1921 kiam li laboris por la Ligo de Nacioj en Ĝenevo. Estrarano kaj poste honora konsilanto de Japana Esperanto-Instituto.

**305 ISOBE Yukiko** 磯部幸子 (1913-08-23—1988-01-15):

Ŝi eklernis Esperanton en 1933 en Ĵiyuu Gakuen (Libera Lernejo), Tokio. Jam en siaj dudekaj jaroj, ŝi fariĝis konsiliano de JEI kaj longjare plenumis la taskon. Okaze de la 50-a UK en Tokio, ŝi prezidis Japanan Vesperon kaj mem prezentis tradician japanan dancon. Ŝi mortis estante la 5a prezidanto de Japana Esperanto-Instituto en 1889.

**304 UMESAO Tadao** 梅棹忠夫 (1920-06-13—2010-07-03):

Pioniro de kultura antropologio en Japanio, etnologo. Post la Dua Mondomilito, en la universitato Kioto li eklernis Esperanton. Li kredis, ke oni devas disvolvigi Esperanton kiel tuthomaran moralan movadon. Li vivis ĝis sia morto kiel esperantisto kaj ofte ĉeestis esperantajn aranĝojn.

**303 Tsukasa KOBAYASHI** 小林司 (1929-03-21—2010-09-27):

Medicina doktoro i.a. pri psikiatrio, verkisto kaj amanto de Sherlock Holmes. Li eklernis Esperanton en 1943. Estrarano de JEI, i.a. tiel redaktoro. Liaj esperantologiaj verkoj kaj por-esperantaj verkoj, verkitaj kune kun sia edzino Yoko estis multaj, kaj pro tio honorita je Premio Ossaka. Li organizis multajn kulturajn iniciatojn, ekzemple kuntraduko de “Strato Zamenhof” de Zaleski Zamenhof. Lia vivoverko nefinita temis pri biografio de Saito Hidekatu, esperantisto kaj latinisto.

**302 KURISU Kei** 栗栖継 (1910-07-28—2009-04-18):

Soci-movadano. Literaturisto. Li partoprenis en la proleta Esperanto-movado. Pere de Esperanto kaj korespondado li kolektadis alilandajn informojn. El tio rezultis ĵurnalismaj artikoloj kaj eldono de libroj. Li fariĝis literaturisto-tradukisto de ĉeĥa literaturo kun la helpo de ĉeĥaj esperantistoj. Li fondis Societon por Japana-Ĉina Amikeco por Korespondado. Ossaka-premiito en 1949.

**Bankedejo (Hukuĵu) / 福寿 KUROITA Katumi** 黒板勝美 (1874-09-03—1946-12-21):

Historiisto. Esperanton li memlernis. En 1906 li fondis Japanan Esperanto-Asocion, kaj li kun Sinmura Izuru ĉeestis en la 4-a Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno kiel la unuaj UK-partoprenantoj el Japanio. Tiam li renkontis Zamenhof.